


LA UNUA
„OVO”-FESTO

La momento fote kaptita dum la publika prezento de la unua „Ovo”-numero en Zagreb. Tostu, manĝu kaj kunĝuu ankaŭ vi!

Fotis B. Sterle

Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.^z

ĜIA MOŜTO - - PORDO!



Desegnigis Teodora Kućinac

Ĉu vi iam ajn, ial ajn aŭ iel ajn meditis pri - PORDO!?! Pri ĝia moŝto - PORDO!?

Ne, vi tute ne eraris. Vi bone tra legis kaj sambone vi komprenis mian demandon ... mi demandis vin ĉu vi iam, ial aŭ iel cerbumis pri - PORDO!?!

Pri - PORDO!?! Pri kiu - PORDO!?! Pri kia - PORDO!?!

Pri iu ajn aŭ pri ia ajn - PORDO! Simple, pri - PORDO! Pri simpla, ordinara, normala aŭ - en la kazo se vi ŝatas kaj preferas superlativan formon - pri la plej simpla, pri la plej ordinara kaj pri la plej normala - PORDO kaj pri ĝia (porda, pordeca) funkcio. Pri PORDO kiun oni malfermas kaj fermas, pri PORDO kiun oni fermigas kaj malfermigigas, pri PORDO kiu malfermigigas kaj fermigas ... ĉiukaze pri simpla, ordinara, normala PORDO kun pordhoko, (kuplo)ĉarniro, hingo, klinko, seruro, ŝlosilo ...

Mi parolas, kiel vi povis rimarki, pri PORDO, pri ĝia moŝto - PORDO, sed samtempe mi pensas pri - via PORDO, pri - mia PORDO, pri - nia PORDO, pri - ilia PORDO ... kaj - tion mi volas kaj devas ripeti, akcenti kaj substreki - mi imagas kaj inkluzivas en mian meditado, esplorado kaj eksplikadon ĉiujn PORDOJN tra kiuj oni eniras aŭ eliras.

Mi simple parolas kaj cerbumas pri la funkcio kaj pri la signifo de ĉiu PORDO, sen iu ajn escepto ... tutegale ĉu temas pri socia (PORDO - de la urbo, PORDO - de la ŝtato ... ktp.) aŭ pri privata PORDO (PORDO - de la korto, PORDO - de la domo, PORDO - de la loĝejo, PORDO - de la banejo aŭ PORDO - de la dormoĉambro ... ktp.). La ĉefafero estas se oni tra tiu PORDO eniras kaj eliras, se oni tiun PORDON uzas, se oni tiun PORDON trapasas.

Kutime ĝenas nin, kutime ni bedaŭras aŭ koleras, foje eĉ - furiozas, se ni scias kaj konscias, se ni vidas aŭ nur supozas, ke iu, ia kaj ies PORDO disigas nin de iu aŭ io ...

Kontraŭe, ni ĝajas kaj ĝojas, foje eĉ - ĝuas, jubilas, frandiĝas kaj ĝuegas, se ni vidas aŭ nur supozas, ke iu, ia aŭ ies PORDO kunigas kaj apartigas nin kun iu aŭ io ...

Tia konduto estas normala, homeca ...

Same tiel estas normale kaj homece ke ni oftfoje - en diversaj situacioj, en ĉiaj humoroj - troviĝas ANTAŬ iu, ia kaj ies PORDO aŭ ke ni devas - kun ĉiaj deziroj, bezonoj, petoj aŭ postuloj - veni ANTAŬ iun, ian kaj ies PORDON ... Ni staras tie ... Ni atendas tie ... Ni staras kaj atendas, ni frapetas, frapas, frapegas ... Ni venas kaj foriras ... esperante ke la koncerna PORDO (tuj!?! iutage!?! iam ajn!?) eble malfermiĝos, ke iu malfermigigos ĝin, ke oni eventuale eĉ lasos nin eniri!?!

Same tiel estas normale kaj homece ke ni, tutegale ĉu ofte aŭ malofte - en ĉiaj situacioj, en diversaj humoroj - hazarde aŭ intence, troviĝas POST iu, ia kaj ies PORDO ... kun diversaj deziroj aŭ bezonoj! Ni interne - post la PORDO, kaj ekstere - antaŭ la PORDO - iuj, multaj aŭ malmultaj, staras, atendas, frapas!?! Ili venas kaj foriras ... esperante ke ni la koncernan PORDON (tuj!?! iutage!?! iam ajn!?) malfermos kaj eventuale enlasos ilin eniri - ĉar ili volas esti kun ni, ĉar ili eble estiĝos eĉ parto de ni mem!?!

Malagrable kaj malbele estas stari kaj atendi ion ajn antaŭ iu ajn, ia ajn kaj ies ajn PORDO ... ĉu ne!?!

Bele kaj agrable estas, kontraŭe, se ni troviĝas fermitaj, baritaj, ŝirmitaj, apartigitaj post iu ajn, ia ajn kaj ies ajn PORDO ... precipe se ni scias ke neniu ĝenos nin, ke neniu staras antaŭ tiu PORDO, ke neniu atendas antaŭ tiu PORDO, ke nenies petoj, postuloj, deziroj aŭ provoj ĝenos nin ...

Mi mem jam kutimiĝis - kiel en la posteno, tiel ankaŭ en la privata vivo - ke mi devas ven(ad)i, star(ad)i, atend(ad)i, frapeti kaj frapadi, esperi kaj esperadi preskaŭ antaŭ ĉiu, ĉia kaj ĉies PORDO ...

Kaj vi!?!?

En la unua numero de „Ovo” mia kara amiko Nikola R. ovumis novam sciencobranĉon: sociologion de fumado. Kompreneble ke mi ne estas sufiĉe kapabla (kiel simpla amatoro sociologo) doni ian signifan kontribuon al la nova sciencobranĉo; mi lasas tion al fakuloj. Sed, se mi ne scipovas pliprofundigi la bazojn de tiu sociologia teorio (kiuj dank’ al la fondinto Nikola estas jam sufiĉe fortikaj), mi kuraĝas plilarĝigi ilin je la psikologia sfero.

Kompreneble, la unua, baza demando en ĉiu serioza esplorado koncerne psikologion (kaj sociologion) de fumado estas: Kial, fakte, la fumantoj fumas? Cetere, la fumadon kiel kondutformon ni ne rimarkas ĉe la vivspecoj, eĉ ne ĉe tiuj starantaj je evolustupo malpli alta ol la homa. Vi ja scias kiel bizaraj, kiel surprizigaj povas esti diversaj bestospecoj. Sed, tamen, eĉ ne unu besto fumas (krom la fumantoj, kompreneble)! Bestoj povas fari ĉion imageblan, sed ili ne fumas. Lumbriko ekzemple, glutas teron, digestas ĝin kaj forĵetas (kakas) ĝin; ekzistas ankaŭ bestoj kiuj nutras sin per la fekaĵoj de iuj aliaj bestoj. Sed eĉ ne unu inhalas intence - fumon.

Ŝajnas, do, ke kontraŭe al neelektaj digestiloj; la spirorganoj estas io pli delikata; kio ankaŭ evidentiĝas en la fakto ke oni povas ne manĝi plurajn tagojn (kaj resti viva) sed provu ne spiri pli ol du minutojn ... Enspiru! Mi ne volas ke „Ovo” perdu unu leganton (speciale se vi estas ankaŭ abonanto). Kompreneble, la fumantoj tuj respondos ke kompari spiradon kun nutrado estas pura demagogio, temas ja pri du tute diversaj vivbezonoj. Certe. Kia ĝojo, kia plezuro estas malsata manĝi ion bongustan! Mmmm ... bonege, bonege ... mmm. La salivo inundas jam mian buŝon, la stomako jam tremas pro la alvenonta donaco, la intestoj jam ekantis bonvenkanton al la baldaŭaj vivosukoj, la tuta korpo festas la festenon, orgias palato kaj lango, la gorgo iĝas feliĉega, eĉ la koro batas en ekscitita takto: man-ĝi-man-ĝi-man-ĝi ...

... la fumanto - Simo



Fotis: Ivica Špoljarec

UMADO PRI FUMADO

...Eu donave?!

Tiom pri la nutrado. Kaj nun, bonvolu enspiri du tri litrojn da bongusta aero. Bongusta? Kiel bongusta? Aero kiel aero. Eble bonihkala, eble freŝa, sed ... ĉu vi sentas dum tiu agado nomata spirado ian plezuron? Vi sentas nenian plezuron? La pulmoj ne svenas pro feliĉego, la traĥeo ne murmuradas mmm ... Ne? Kompatinda vi, vi certe ne estas fumanto. Nur via nazo ofte plena da sekreciaĵoj, ofte ŝtopita per malpuraĵoj, nur la kompatinda nazo daŭre batalas trafikigi la senĉesan aerofluon tien kaj reen sur la konekta magistralo de via vivo. Sen ia ajn rekompensa plezuro.

Sed, jen! Aperas la fumado, aperas la plezuro de fuminhalado. Kia agrabla sento! Spirado nun havas ian sencon, ĝi, normale tute senplezura, eĉ eble por multaj senutila, ĝi ricevis nun sian „internan ideon”. La pulmoj svenas pro ĝojo kaj koro, ho mia kor’, saltas el brust’ pro fumodor’. La nazo kaj la traĥeo transformiĝas nun en fierajn fabrikajn fumotubojn, flirtas ĉie unuademajo-flagoj ... en la novajn batalojn, en la novajn batalojn la buŝo solene manifestas la fumosignalojn. Fajro = energio; energio = progreso; progreso + ĝojo = plezuro!

En ambaŭ homspecioj ekzistantaj en la teorio de Nikola R. – fumantoj kaj nefumantoj – ekzistas opuloj kiuj opinias la fumadon maniero de drogokonsumado. En la tabako troviĝas nome la drogo nikotino. Ili nur parte pravas. Nikotino ne estas la nura (nek la ĉefa) kaŭzo de fumado. Ne havante tabakon (kiel jam okazis dum malfacilaj temoj, ekz. milito) la vera fumanto fumos kion ajn, li rulumos cigaredon de iaj ajn folioj, fagfolioj ekzemple. Cetere, la fumanto-reĝoj t.e. la pipofumantoj, tute ne inhalas fumon. Ili nur gustumas ĝin. Krome,

se la nikotino aktorus la ĉefan rolon en la fumado, en tiu okazo estus multe pli efike teni la cigaredon (cigaron, pipon) ne en la buŝo sed en la nazotruoj. Fakte, ne unu sed du samtempe. Ekzemple, en la dekstra nazotruo oni fumus cigaredon kun filtro, en la mal-



dekstra sen filtro; aŭ en unu nazotruo fortan kaj en la alia mildan cigaredon, aŭ ... ktp. Oni eĉ povus produkti novajn formojn de interplektitaj cigaredokombinaĵoj havantaj po du finiĝoj flanke de la nazo kaj nur unu flanke de fajro. Al la tabakindustrio tio donus tute novajn prosperiĉajn eblecojn, sed la aliajn detalojn pri miaj inventoj tiuspecaj mi ne volas senpage aperigi ĉi tie. („Ovo” estas

legata en la tuta mondo kaj mi ne deziras ke miaj sekretaj planoj falu en la manojn de cigaredoproduktistoj, speciale ne de tiuj en la kapitalistaj landoj).

La fakto ke fumantoj tamen fumus tra la buŝo pruvas mian originalan hipotezon ke fumado estas certagrade simila al manĝado. La manĝado (enspirado) de bongusta manĝaĵo (fumo).

Sed (ĉiam iu „sed”), tio ne estas la sola kaj ĝenerale valida klarigo „kial fumantoj fumus”. Nome, ne ĉiuj fumantoj havas la bezonon esti sterkiĝantaj per la fumo. Certa procentaĵo da fumantoj fumus ne pro la fumo mem sed pro la fumsuĉado. Ili restis suĉinfanoj. Estinte beboj ni ŝatis senti en la buŝo la patrinan cicon, ni spiris je ĝi, poste ni daŭrigis suĉi cicumon aŭ niajn fingrojn, kaj, estante nun plenkreskuloj, kelkaj el ni ŝovas en la buŝon cigaredon, cigaron, pipon kaj ... diversajn objektojn enbuŝigeblajn. Ili estas – fumantoj! Plenkreskaj suĉinfanoj sopirantaj tabakcicumon.

Do, kiel vi vidas, la respondo al la komenca demando „kial la fumantoj fumus” estas kompleksa, plurnivela. Dependas de la unuopa kazo. Mi, ekzemple, mi fumus nek pro la suĉplezuro, nek pro la nikotindrogo (kiel mia edzino), nek pro la enspirado de bongusta aero, nek pro ia tia sensenca kialo. Mi ja ne estas (simpla) stulta fumanto! Fakte, mi ne scias kial mi de tempo al tempo (nur kelkfoje po tage) bruligas cigaredon. Unu el la eblaj klarigoj: mi verŝajne ŝatas esti de tempo al tempo idioto por diferencigi tiajn animostatojn de la aliaj, normalaj. Se vi havas ian pli bonan klarigon, skribu al mi, skribu al „Ovo”.





MARIA JAGIELLO -- DANGOW

LA GRANDEGA AMO

Ŝi loĝis en unu malgranda ĉambreto super apudurba drinkejo. 12 m² – la dimensio konforma al la leĝo.

Ŝi prigluis la hirtecon de muroj per desegnita papero kaj en malplena kompotujo ŝi tenis la faskojn da kampaj floroj kolektitaj dum vilaĝekskursoj. Sidante super manuskriptoj, ŝi ŝtopis la orelojn, por obtuzigi la bruegon de ebrulaj konfesoj, kaj krom la frote-difektita mantelo, krom la kataro de stomako kaj multaj ekzamenoj, ŝi asertis ke la mondo estas bela.

Krom sian fakon, ŝi amis la malnovajn pentraĵojn, la bonan muzikon, la naturon kaj librojn.

Vizitante iam en unu el la plej interesaj galearioj de orienta arto, ŝi rimarkis ian nigretan, sciivoligan vizaĝon de junulo.

Neatendite dum aŭtuno, ŝi ekkonis lin persone kaj pli proksime dum iu studenta dancvespero. Li estis ĝuste finanta sian politeknan fakultaton, kaj krom tio, laŭ komuna opinio, li estis soci-age forte absorbita.

– Vi havas belegajn, bonajn okulojn – li diris al ŝi en unu memento – okulojn, al kiuj oni povas konfidi la tutan komplikitan veron de mia vivo.

Ili interkonsentis por promenado en aleoj. Poste ĉiutage post la prelegoj li reveturigadis ŝin per plenŝtopita tramo ĝis unu el la vojfinaj haltejoj kaj laŭ kurbeta vojeto li rekondukadis ŝin hejmen.

– Vi vivas tro askete – paroladis li. – Vi ne partoprenas la komunan vivon, vi enkokoniĝas kaj dronas en la mondo de teoriaj opinioj kaj esploroj. Mi devas elŝiri vin de tiu malvasta rondo, vekti vin, kunigi kun la vivo kaj aktivigi.

Ia-foje li parolis (oni opiniis, ke krom la fervoro de aganto li posedas denaskan eksenton de linioj kaj koloroj):

– Krom via beleco, tiel malmulte estas en vi da virineco kaj koketeco. Al viaj haroj mi donus lazuron. Jes, bluan kun malgranda almiksaĵo de oro, kaj vi agnoskas nur mallumajn nuancojn.

Dum li ŝin kisis, ŝi parolis:

– Kiel multe da aĵoj estas antaŭ ni, ĉu vi sentas la feliĉ-ekblovon?

– Jes, karulino. Mi kaj vi: tio estas multo. Pensu ke ni ne povis ne renkontiĝi ...

Iun tagon li enrigardis ŝian ĉambreton.

– Kiel vi povas loĝi tie-ĉi karulino? Konstante „la ĵazo”, la frapado per glasegoj kaj raŭkaj voĉoj de bieramantoj. Via subtileco ... Li ekprenis ŝian kapon en ambaŭ manojn kaj kisis ŝiajn lipojn. Kiam post unu momento la karesoj estiĝis tro agrezivaj, la junulino ekmalĝojetis:



Desegnis Vjekoslav Ivezic

– Tio aspektas tiel, kvazaŭ vi intence venis por profiti la izolecon de mia ĉambro. Vi ĉiuj samas ...

Ŝi kunvolviĝis sur la lito kaj ploris.

Li kliniĝis maltrankviliĝinta kaj ekkaresis ŝiajn helajn harojn.

– Vi estas subtila karulino, sentema, junulina kaj naiva. Mi amas vin certe pro tio, pro viaj larmoj kaj indigno, pro tio ke vi ne estas simila al aliaj virinoj.

– Kial do ...

– Kial? ... Simple, mi tro amas vin. Infano! Ĉu vi ne vidas, ke sen vi la vivo estas senigita je koloroj? Ne, pli longe ne povas tiel esti. Mi iĝas nun ĉie malzorgema, eĉ en mia rondo. Ni devas verŝajne geedziĝi, sed tio estos ebla nur post unu jaro. Vi scias, mi ricevos laboron ...

Ili tenis sin man-en-mane observante la ombrojn de frua krepusko vualantaj la ĉambreton. La ĵazo kaj kaliktintado aliformiĝis en ŝiaj oreloj je tonoj de ia super-belega simfonio.

– Ni estas feliĉaj – flustris ŝi.

– Jes, karulino.

– Malgraŭ ke ni komprenas amon iom alie ...

– Hmm ...

– Ni amas en ni mem tion, kio estas esenca valoro, kio ne velkos tiel rapide kiel la korpo. Pensu, kiel profunde sentas vi ... mi ...

– Hmm ...

– Kiel nomi tiun-ĉi amon?

Ankoraŭ kelkaj frazoj, kelkaj senordaj memkonfesoj kaj li ekstaris por adiaŭi.

Ili interkonsentis por la sekvonta tago, sed li venis neniam ...

F. V. DORNO

SURPRIZO

Antaŭ pli ol kvindek jaroj mi de hazarda konatulo ricevis Esperanto-ŝlosilon de la gramatiko kaj eta vortaro.

La afero min interesis kaj mi, kun la foja kaj rea helpo de Léon, la ulo, kiu al mi donacis la verdan libreton, sukcesis iom scipovi la lingvon.

Sed post du jaroj mi konstatis, ke nek Léon nek la ŝlosilo sufiĉas por majstri funde Esperanton kaj enskribigis min kiel lernanton en vesperokurson de la urba lernejo en Louisastrato. Du jarojn poste mi havigis al mi la diplomon pri finstudado.

La instruisto, Sinjoro Schroeyers, admonis afable, ke diploma ne sufiĉas kaj konsilis aliĝi al iu grupo por min ekzerci en la parolado kaj trovi korespondantojn eksterlandajn por perfektigi mian stilon. Mi sekvis ambaŭ konsilojn.

Por plaĉi al ĉiu mi membriĝis en du grupojn samtempe, kun la re-

zulto ke mi plaĉis al neniu. Pro pura petolemo, mi aliĝis al ankoraŭ tria grupo.

Trovi korespondantojn pli facilis. Mi komencis frenezan skribegadon kun Japanoj, Ĉinoj, Hindoj, Germanoj kaj Rusoj.

Post pli-malpli longe miaj leteroj ne plu estis respondataj. Finfine restis Willy, Germano, kiu estis fidela amiko ĝis sia morto, kaj Antonia, studentino el Leningrado. Ŝi unu fojon sendis foton. Ŝi aspektis bonhumora beleta junulino. Nia korespondado estis sufiĉe intensa kaj mi supozas, ke ni finfine bone konas unu la alian kun niaj esperoj, niaj sopiroj, niaj karakteroj. Iam mi sendis foton de mi.

Venis la dua mondmilito.

Post la malamikaĵoj mi rekomencis la letterskribadon sed de Antonia mi ne ricevis respondon. Mi supozis ke ŝi pereis en la infero de l' trijara

sieĝo de Leningrado.

Jarojn poste mi vojaĝis al Kievo, por partopreni sciencan kongreson. Mi revenis voje de Moskvo kie mi ricevis de Esperantisto — majoro de la Ruĝa Armeo — fidindan adreson de helpema samideanino en Leningrado. Barbara, tiel ŝi nomiĝis, montris al mi la urbon kaj ĉiujn vidindaĵojn. La Kirov-teatro-baledojn mi trovis ankoraŭ pli belaj ol la Bolŝojaj. Mi komencis korespondadon kun ŝi, sed tute forgesis paroli pri iu Antonia.

Mi promesis al mia edzino vidiĝi al ŝi la baledojn, kaj samtempe konatiĝi kun Barbara.

Du jaroj pasis. Ni decidis trapasi la novjarajn tagojn en Sovetio.

Barbara ĝojis pri la revido kaj plenkore amikiĝis kun mia edzino. La gastamo de la Rusoj ja estas proverba.

„Morgaŭ estos Zamenhof-tago kaj vi estas invitataj ĉeesti. Mi jam diris ke vi vizitos nin.”

La Esperanto-klubo de Leningrado havis sian lokon en la Domo de l' Amikeco en la centro de la urbo.

La kunvensalono estis pli granda ol mi atendis. Proksimume cent membroj ĉeestis.

Post la kutimlj festparoladoj okazis interfratiga, intima rondo en alia, malpli granda salono. Ĉiu volis paroli kun ni, sciigi pri ni, babili.

Je iu momento mi diris: „Ĉu vi scias ke iam, antaŭ multaj jaroj, mi korespondadis kun membrino de via klubo? Ŝi nomiĝis Antonia. La familan nomon mi jam forgesis ... Atendu, mi kredas ke estis Gorobka ... aŭ Gurbona ... ne, ne; mi memoras: estis Garbunova! Antonia Garbunova!”

Barbara tute dolĉe prenis mian manon. „Rigardu, jen, en la angulo en brakseĝo. Jen sidas via Antonia!”

Mi ne scias, kiu el ni estis la plej surprizita. La unuajn momentojn ni ne kapablis eligi unu solan parolon.

Nedifinite ŝi iomete ankoraŭ similis al la persono sur la foto sendita. Sed kiam ni ekkorespondis, ŝi estis ĉarma fraŭlino kaj mi juna viro. Nun mi estis, post kvardek tri jaroj, diketa kalva sinjoro; ŝi kripla matrono. Dum la milito ni ambaŭ transloĝiĝis. Niaj leteroj neniam atingis la celon.

Ni, ŝi kaj mi, ploretis.

Restos por ĉiam la plej emocia okazintaĵo de mia tuta Esperantista vivo ...

NOTO

En la pasinta numero ni hazarde el-lasis la nomon de la aŭtoro kiu verkis la artikolon „Usonaj travivaĵoj”. Do, la aŭtoro estas Nikola RAŠIĆ. Ni pardonovas!







NI ALPORTIS
GRANDEGAN KVANTON
KAJ ANKORAŬ
ĜI NE TRANSFORMIĜIS
AL KUKOJ.

MI OPINIAS KE
NUN SUFIĈAS
POR
-SIMSALABIM-.

SINJORO, MI HAVIGIS
POR VIA DOMRIPARO
SABLON, MI DONAS
AL VI ĜIN DUONPREZE.

BRAVE,
KNABO.



SE MI PENSAS KIOM MI DEVUS
PAGI NUR POR LA TRANSPORTO!!
JEN INFANOJ, POR LA KUKOJ!

KAJ NUN, INFANOJ,
ĈOJ, REKTE AL LA
DOLĈAĜEJO!

HURA!

VIDU, TIEL ONI FARAS KE
ĈIUJ ESTU KONTENTAJ.

LA SINJORO RICEVIS
SABLON KAJ NI KUKOJN.



TRE BONGUSTIS
VIA MAGIA
FORMULO.

NUN NI
FAROS EL LA
SABLO
KASTELON.

SED NI NE PLU
HAVAS SABLON
POR LUDO!

VI JA MEM DECIDIS
KAJ FORPORTIS ĜIN.
KIAM VI MANGIS
KUKOJN VI NE
PENSIS PRI TIO.

JOHÁN VALANO

ILI KAPTIS ELZAN!

ELZA

Ĉe la enirejo de la grafina bi-eno, tute proksime al la kastelo, staras samaĝa ŝtona domo. En ĝi estis aranĝita plaĉa apartamento, kie loĝis Cipriano, lia edzino Elvira kaj – de tempo al tempo, jen longe, jen mal- longe – ilia filino Elza.

En la sidĉambro kun malnovaj, brile puraj mebloj, kie la servista paro nun troviĝis, la atmosfero estis peza.

„La vivo estis agrabla ĉi tie,” Elvira diris.

„Agrabla,” eĥis Cipriano.

„La grafino estas iom stranga, kelkfoje, sed al ŝiaj strangaĵoj ni kutimiĝis,” ŝi daŭrigis.

„Ni kutimiĝis,” sonis eĥe la edza voĉo.

„La kastelo estas granda, sed ŝi vivas nur en eta parto de ĝi, kaj ne zorgas, ĉu la resto estas pura aŭ ne.”

„Ne zorgas.”

„Ni ne adaptiĝos al alia mastri- no. Aŭ mastro.”

„Ne. Ni ne adaptiĝos.”

Elvira prenis paperan poŝtukon, brue nazpurigis en ĝin, kaj ploris. Ŝi estis same dika kiel la edzo, sed pli malalta, kaj vidiĝis, ke ŝia ronda, ruĝeca vizaĝo pli kutimas ridi ol esprimi malfeliĉon.

Malfermiĝis la pordo, kaj kna- bino eble 21-jara envenis ridetante.

„Bonan ... ! Ej! Kio okazas al vi? Vi aspektas, kvazaŭ la tero ĵus rompiĝis sub viaj piedoj ...”

„Ĝi rompiĝis,” eĥis Cipriano, kvazaŭ ne plu kapabla pensi. Ŝajnis, ke li eĉ ne rekonas la propran fili- non.

Lia edzino klarigis la teruran situacion. Je ilia aĝo, en la nuna eko- nomia situacio, trovi laboron ne estos facile. Sed eĉ se ili retrovus, la simpla fakto devi forlasi ĉi tiun lo- kon, al kiu ilin ligis tiom da jaroj da ĉeesto, da laboro, da travivaĵoj, rom- pis al ili la koron ĝis apenaŭ elporte- bla sufero.

Ankaŭ la juna vizaĝo de Elza mallumiĝis. Ŝi laboris en la urbo, tute sendepende, kiel kudristino, kaj ŝi sukcesis aranĝi sian vivon tre kon- tentige, kun sufiĉe da libereco. Ŝi tute ne bezonis monan helpon de la gepatroj, sed ŝi amis ilin, tre ŝatis ilin viziti neatendite, kiel hodiaŭ, kaj, ce- tere, same subite foriri. Ilia malfeli- ĉo efikis al ŝi korŝire.

„Kaj mi venis ĉi tien por rakonti ion ridigan ...” ŝi diris, eligante pro- fundan ĝemspiron.

„Rakontu do,” ameme diris la patrino. „Eble tio helpas nin pensi pri io alia.”



LA SOLVO

„Temas pri io tute negrava, sed kion mi trovis interesa, rakontinda al vi. Mi ĵus vizitis Nikolaon en la hospitalo, kaj li diris al mi, ke, laŭ interparolo nevole aŭdita de flegis- tino, s-ro Pipelbom serĉas edzinon pere de agentejo Belpar!”

„Serĉas edzinon, ĉu?” Ŝajnis, ke subite Cipriano vekigis el sia senpen- sa stato. „Eble tie kuŝas nia solvo.”

„Solvo?” „Kion vi volas diri?” samtempe parolis la du virinoj.

„Eble mi ne estas realisma. Mi pensis, ke se ni sukcesus aranĝi – per tiu agentejo – ke Elza edziniĝu al li, ni ne plu havus problemojn. Li estas tiel riĉa, ke li eĉ ne scias, en kiom da bankoj kuŝas lia mono, kaj ...”

„Ĉiaokaze, eĉ se li petos min, mi ne edziniĝos al tiu maljunulo,” la filino interrompis, decideme.

„Li ne estas maljuna. Mi dubas, ĉu li aĝas pli ol 50 jarojn,” rebatis la patro.

„Eĉ se li aĝus nur dudek kaj estus pli bela ol ... ol ... ol ... , nu, tre bela, mi malkonsentus. Mi amas Nikolaon, kaj kunvivos kun neniu alia.”

„Via ĥemiŝto estas bona knabo, sed ne temas pri amo nun, nur pri maniero helpi al la kompatindaj gepatroj.”

„Ĉu vi perdis la saĝon, Cipria- ano?” la edzino intervenis. „Pripen- su momenteton. Vi neniam elportus, ke via filino malfeliĉas la tutan vivon nur por nia komforto. Ŝajnas, ke la grafina informo batis al vi la kapon kaj vin stultigis.”

Ĉiuj tri restis dum longa minuto silentaj.

„Kaj tamen eble estas solvo,” diris Elza tre malrapide, apartigante ĉiun vorton. La gepatroj rigardis ŝin. Ŝia vizaĝo estis luma denove, kiel kutime ĉe tiu ĝenerale gaja knabino.

„Solvo, ĉu vere?”

„Jes. Se li edziĝus al la grafi- no...”

(daŭrigo en la sekva numero)





LA PLEJ MONDA KRIZO




STREĤTA SITUACIO

BALDAŬ PEREOS LA MONDO !




TIAM APERIS KOSMA SĪPO.....



..... EL KIU ELIRIS.....



SED NE ! TIO ESTIS EKSTERTERULO LOGANTO DE SUPRA ETAGO. KIUN LA HOMOJ KAĜ ILIAJ MALPACOJ KOMENCIS NERVIGI.....



ANTAŬ TIA MINACO LA HOMARO UNUIĜIS POR TIEL TROVI ELIRON EL LA SENELIREJO



ATOMARMILOJN ILI FORPORTIS SUR LA LUNON KAĜ ĈIO EKSPLODIS.

TIEL KOMENCIGIS LA NOVA EPOKO. LA EKSTERTERULO FORIRIS KONTENTA.....



SUR LA TERGLOBO EKREGIS LA AMO KAĜ BONSTATO.



KIEL BELE



SED LA HOMO NE PACEMAS. IO DEVIS OKAZI....



.... KAĜ AŬTUNE EKPLUVIS...




TIO ESTIS **inundo**



PLUVIS, PLUVEĜIS.

LONGE, LONGEĜE....

KAĜ TIEL EKESTIS LA GRANDA OCEANO EL KIU BALDAŬ EKEVOLUIS LA VIVO.....



4-1982

EKSPOZICIO DE JUNULARA GAZETARO

Okaze de la Internacia Junulara Jaro „Ovo” decidis organizi grandan internacian ekspozicion de junularaj gazetoj. La ekspozicio estos malfermita en oktobro en Zagrebo kaj la redakcio de „Ovo” petas ĉiujn legantojn sendi al ni ekzempleron de sia nacia junulara gazeto de kiu ajn speco. Por vi ĝi ne estas granda elspezo, por ni grava evento kaj propagandilo. Lastfoje Internacia Kultura Servo el Zagreb organizis similan ekspozicion de naciaj legolibroj el 50 landoj helpe de esperantistoj. La ekspozicio havis grandan reeĥon kaj helpis Esperanton por penetri en lernejojn de Kroatio. La ekspozicio post la prezento en Zagrebo povos migri al aliaj urboj kaj landoj.

ĈINIO INTER LA PLEJ GRANDAJ LIBROELDONISTOJ

Ĉinio estis pasintjare unu el la plej grandaj libroeldonistoj en la mondo. Jam dum la unua duonjaro en 1983 estis presitaj 16.000 librotitoloj en la eldonkvanto de 2,4 miliardoj da ekzempleroj, kio estas multe pli ol la jaron antaŭe.

La ministerio pri kulturo mencias, ke, koncerne la novajn librotitolojn, Ĉinio okupas la sesan lokon en la mondo. Antaŭ Ĉinio troviĝas Usono, Sovjetunio, Germana Federacia Respubliko, Japanio kaj Britio. Laŭ la eldonkvantoj Ĉinio estas, senkonkurence, sur la unua loko.


DUDEK JAROJN KAŜITA PRO 5 DOLAROJ

Robert Eliot Burns, Usonano, partoprenis en rabo de iu vendejo en 1922-a jaro. Kiam li vidis ke temas pri rabo, li malakceptis preni la monon. Tamen aliaj kunkomplikoĝoj ŝtelis la tutan monon — 5 dolarojn kaj 80 cendojn!

Ĉiuj estis samtage kaptitaj kaj li estis kondamnita al 5-jara peza karcerpuno. Li forkuris samjare el la malliberejo kaj preninte alian nomon vivis en Ĉicago. Intertempe li riĉiĝis kaj eĉ fariĝis redaktoro de ĉikaga gazeto. En 1929 pri li eksciis lia eksedzino kaj denuncis lin al la polico. Li estis ree arestita kaj enkarcerita en la sama malliberejo. Samjare li denove sukcesis forkuri kaj enloĝiĝis en alia usona ŝtato kie li post kelkaj jaroj publike skribis kelkajn artikolojn pri sia vivo kaj teruraj kondiĉoj en usonaj malliberejoj. Apenaŭ en la jaro 1944 li estis formale liberigita de la verdikto kaj povis libere vivi.

MUZIKEMA ARBO

Vilaĝanoj de Taŝkimir, vilaĝo en Sovetunio, dum pluraj tagoj venadis aŭskulti grandan dekkvintmetran arbon kiu muzikis. Eĉ el la ĉirkaŭaj vilaĝoj komencis alvenadi „turistoj” por aŭdi la „miraklan arbon”. Fine iu vilaĝano decidis esplori la aferon. Pene li grimpis ĝis la pinto kaj trovis — radio-aparaton. Montriĝis ke iu aglo ŝtelis la aparaton kaj lasis ĝin sur la arbo. Tiel bedaŭrinde finiĝis la ekflorinta „turismo” de Taŝkimir.



Ideo: Blagojĉe Kocevski
Desegnis: Ljiljana Kocevski

ŜERCE

— Kial forkuris diversdirekten tiu grupo?

— Ĉu vi ne aŭdis nun, ke iu malsaĝulo de tie ekkriis: „Kaptu la ŝteliston!”

— Vidu, kiel multaj estas maraj erinacoj ĉi tie? Kaj en la prospekto estas skribite: „Plago, pri kiu sonĝas multaj”.

— Normale, sed ili forgesis alskribi: „... fakiroj”.

Hodiaŭ estas ofte aŭskultata la demando sence: Kia diferenco estas inter arkeologoj kaj kosmetikistoj?

Arkeologoj malkovras antikvaĵojn kaj kosmetikistoj ĉiam pli bone kaŝas ilin.

Iuj libroj estas senkaŭze forgesitaj sed neniu estas senriproĉe memorita.


— Kelnero, ĉu vi servadas ankoraŭ tiun vinspecon, kiun vi rekomendis al mi la pasintan dimanĉon?

— Jes.

— Mi petas tiam, surtabligu por mi botelon da biero!

La solvo de la rebuso en la pasinta numero estas: HELIKOPTERO.

Trovu la ĝustan vojon inter la birdo kaj la birdido.



Aŭtoro Duro Janĉi



ÖKISTA, Türkenstrasse 4, Wien 9, Aŭstrio, havas ekflugojn de sur aerhavenoj de Aŭstrio, Germanio, Italio, Belgio, Anglio. Jen kelkaj flugeblecoj de sur viena aerhaveno. La prezoj estas en aŭstraj ŝilingoj.

Vojaĝcelo	Prezo de unu-direkta bileto	Prezo de revenbileto
Caracas	6.170.-	12.340.-
Mexico City	7.590.-	13.000.-
Montevideo	9.320.-	18.640.-
New York	5.950.-	9.360.-
Bangkok	6.160.-	10.580.-
Dacca	5.780.-	10.500.-
Jakarta	—	14.330.-
Kuala Lumpur	6.000.-	10.900.-
Manila	8.580.-	15.620.-
Melbourne	—	19.980.-
Kinshasa	6.050.-	11.000.-
Lusaka	7.540.-	13.700.-

„OVO“
INTERNACIA GAZETO POR DISTRO
KAJ AMUZO
Aperas 15 foje jare.

ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio.
KONSILANTARO: Ljerka Begić, Zlata Cundeković, Dorđe (Gorđe) Dragojlović, Gordana Plavšić, Slavko Šimunić, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec.
REDAKCIO: Milena Grgić, Jozo Marević, Nikola Rašić, Slavko Šimunić (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Špoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tišljar, David, Rey.
ADRESO: „OVO“, Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. (041) 424-660.
PRESAS: Srednja ŝola tiska in papirja, Ljubljana, Jugoslavio.
PREZO de unu ekzemplero: 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.- din.
JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.- din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de la enpagado.
PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

PERANTOJ

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo“, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk.
BRITIO: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF
FRANCIO: Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.
FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Postfako 1450, D-4790 Paderborn.
KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Queb. H2G 2R8.
NEDERLANDO: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

INTERNACIA HELPO

Ĉi nokte vi ne povis dormi? Viaj problemoj ŝajnas al vi nesolveblaj? Vi sentas vin tute sola kaj senpova en tiu ĉi vasta mondo? Ne estu pesimisto, levu la kapon! Almenaŭ OVO-redakcio pensas pri vi. Por helpi al vi ni enkondukis la rubrikon „Internacia Helpo“. Tio signifas ke ne nur la redakcio, sed ankaŭ nia legantaro kunhelpos ...

Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo certan tempon estis sankta loĝo, libera de fumantoj. Kiel oni sukcesis fari tion? La batalo inter fumantoj kaj nefumantoj estis akra, aparte vintre, kiam pro la malvarmeco oni ne povis malfermi la fenestrojn. Iun tagon venis nia kara amiko Nedeljko kun boteleto da amoniako. En ĉiun cindrujon kie fumantoj demetadis cindron li enverŝis iom da amoniako. Ĉiuj komencis kriaĉi: Kion vi faras? Ĉu vi estas stulta, de maodoro ni ne povas spiri! Ni ĉiuj mortos de tiu malbenita odoraĉo!!!

Kun sankta vizaĝ-mieno li sidis kaj respondadis: Mi vere bedaŭras sed sen tio mi ne plu povas vivi. Mi scias ke tio ne estas saniga afero, sed kion mi faru ... tutsimple mi ne povas deĉuti mi ĉi ... Krom tio mi ĝuas tiun odoron, vi fumantoj certe komprenas min. La sama afero estas kun vi kaj la cigaredoj. Mi vere bedaŭras se mia malvirto ĝenas vin. Ha, kion fari ... iuj ŝatas cigaredojn, iuj amoniakon ...

! Mi dezirus ricevi la revuon „La migranto“ ... ĉar en mia lando ĝi ne estas abonebla. Mi povus sendi reciproke la revuon „Pola Esperantisto“ aŭ E-librojn, poŝtmarkojn, bildkartojn ... ktp.

Terasa Jankowska, ul. EM. Plater 12/14, PL-00-669 Warszawa, Pollaŭdo

ga, ga...

De tempo al tempo mi legas ankaŭ pri la novaj E-libroj. Estas mirinde kiam da perfektaj kaj geniaj lernolibroj aperas ĉiutage en Esperantujo. Eldonante ilin niaj fakuloj vere solvas la problemon de disvastigado de la esperantistaro. La problemo nun estas tia ke ekzistas tiom da geniaj lernolibroj ke ĉiu esperantisto kiu konatiĝas kun almenaŭ du geniaj lernolibroj, surbaze de ili skribas trian pli genian ... Tamen la edukistemo de nia facila lingvo ne estas kompleta. Oni ofte forgesas ke ne sufiĉas nur esti parolanto de internacia lingvo. Oni devus vivi kiel vera esperantisto, vesti sin alie ol aliaj homoj, havi propran vivmanieron ... Centoj da novuloj venas al niaj Esperanto-kluboj, kaj krom kelkaj bravaj obstinaj esperantistoj neniu prelegas al ili pri tiu flanko de nia movado ... Eble pro tio ĉar mankas tiutemaj lernolibroj. Mi deziras forigi tiun mankon de nia movado kaj mi faras koncepton pri tio kion mi skribos en tiu ĉi geniaĵo.

Unuavice mi instruos la novulojn kiel propagandi Esperanton. Ni scias ke ni vivas en tempo kiam oni ĉion devas forte kaj saĝe propagandi. Mi proponas ke ĉiu vera esperantisto estu vera Esperan-

to-propagandisto. Kiel? Tutsimple fariĝu ni ĉiuj moviĝantaj kaj laŭdeblaj Esperanto-ekspozicioj. Ni devas nin ornamu per sufiĉe grandaj Esperanto-insignoj (la plej bona estus telegrandaj). Se vi ne sukcesus ie trovi sufiĉe grandajn insignojn vi povas ornamu vian robon per kvin aŭ ses malgrandaj. Dum mia lasta Esperanto-aranĝo mi vidis unu samideanon kun ses meritinsignoj ĉiuj identaj, tio vere plaĉis al mi. En mia grego bedaŭrinde nur unufoje en la vivo oni povas ricevi tiun meritinsignon, kaj tiu brava samideano havis eĉ ses!!! Feliciĝu!!! Por virinoj mi proponas produkti multe da verdsteletaj ornamajoj. Al mi tre plaĉas ankaŭ kiam mi vidas ke iu promenas tra la urbo portante verdan flageton!!!

Apartan artikolon mi dediĉos al nia sankta batalo kontraŭ la profesia laboro en nia kara movado. Vere mi kredas ke tio devas esti sufiĉe granda artikolo ĉar ni, bravaj esperantistoj ne permesu ke en nia movado oni faru ion profesie. Esperanto ekestis sen profesiaj kaj ĝi devas tia resti ĝis sia lasta spiro. Profesiaj esperantistoj estas tiuj kiuj vivas de Esperanto kaj ni neprofesi-

aj, ni estas la solaj batalantoj kiuj vivas por la glora ideo de la internacia lingvo. Ni fakte ne havas sufiĉe da tempo dum la tuta jaro okupiĝi nur pri Esperanto, sed unufoje jare kiam ni kunvenas ĉe nia jarkunveno, tiam oni povas vidi nian veran valoron. Niaj paroladoj, programoj, planoj por la sekvontjara laboro estas multe pli bonaj ol tiuj de profesiaj kiuj nur ĝenas starigante praktikajn demandojn ...

Laŭ mi Esperanto estas la sola valora lingvo en la mondo. Ĉiu vera esperantisto neniam devus lerni iun ajn alian lingvon krom Esperanto. Pro tio Esperanto-kursoj devus daŭri tre tre longe. Esperanto estas tre facila lingvo, sed multaj ne komprenas tion, pro tio ĉiu bona instruisto minimume 20 instruhorojn faras prelegojn pri la facileco kaj praktikeco de Esperanto. Nur tiam kiam li konvinkis la aŭskultanton pri la facileco de Esperanto li povas komenci instrui ilin ankaŭ la lingvon. La lernolibroj devas esti grandaj kaj dikaj. Nur tiaj ili estus ankaŭ multekostegaj. Se lernolibro ne estas tia, saĝaj homoj ne kredos ke Esperanto estas lerninda lingvo. Jes, ne forgesu, la sukceso de Esperanto-kursoj dependas nur de iliaj longeco kaj daŭro kaj de la dikeco de la lernolibroj.

Tio certe ne estos ĉio kion enhavos nia lernolibro, tio estas nur parto de mia saĝeco kiu savos la Esperanto-movadon.

KONKURSO!

SENDU AL NIA REDAKCIO ĈION
KIO ESTAS LIGITA KUN OVO KAJ
OVUMADO.


Ekzemple: serĉojn, karikaturojn, fo-
tojn, poemojn, rakontetojn, rebusojn,
proverbojn, receptojn pri ovomangoj
ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri
ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la
rolo de ovoj en la homa historio, pri la
specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita
kun ovoj.

Vi povas sendi ion kion vi mem el-
pensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis,
tralegis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aperigados
viajn kontribuojn kaj premiojn la
plej kvalitajn.

Jen nia adreso:

Kroatia Esperanto-Ligo
(„OVO“-konkurso)
Amruševa 5/I
YU-41000 Zagreb



VINTRA OVRECEPTO

Unu el la fizikaj proprajtoj de la ovojn
dum vintro estas ke ilia blanka parto, sub
ago de frosto (aŭ frostago) negiĝas. Se vi
ne kredas min, faru tion kio sekvas kaj mi-
rante vi vidos la miraklon. En bovlego dis-
igu la blankajn partojn de tri ovoj. Kun 100
g da sukerpulvoro kaj vanilo, vipu tiujn
ovojn ĝis ili plenigas la bovlegon. En kuse-
rolo boligu mezlitron da lakto kun basto-
neto da vanilo. Kuiru en ĝi belajn kulera-
fojn de vipitaj blankoj, du minutojn por
ĉiu vico. Elgutu ilin sur tuko. La flavajn
partojn sur kiujn oni verŝas la bolantan
lakton, ĉiam turnante, remetu iomete sur
fajron. Verŝu en pladon, metu la blankajn
negigitajn ovbulojn sur la flavan saŭcon.
Ĉu ni ne pravis? Vidu, la belaj ovbuloj
aspektas kiel negbuloj. Oni nomas ilin:
Negovoj. Manĝu ilin post lasado en fro-
tilo, kompreneble, la neĝo devus esti mal-
varma! Mi demandas min, kiam esperan-
tistoj faras tiun dolĉaĵon, ĉu la negsteloj
estas verdaj?!

Therese Sabatier
(Ormesson, Francio)

FOTO



Ekzistas neimageble multe da homaj vizaĝoj,
loĝlokoj, pejzaĝoj kaj vivsituaĵoj dise tra la
mondo. Neniu el ni, en sia vivo, havas oka-
zon vidi ĉiujn ekzistantajn belajn, ĉeseti
ĉiujn okazajn kaj renkonti ĉiujn homojn,
sed ĉiu el ni posedas ia parteton de la tuta.
Ni deziras ke, pere de fotoj, en tiu ĉi rubriko
ni interŝanĝu niajn bildajn posedaĵojn,
simple por pli senti la kunestadon kaj por
pligrandigi nian kontakton pri la mondo.
Al ĉiu foto kiun vi sendas aldonu mallongan
priskribon.

„INFANOJ“

La knabo estas el Meksikio kaj la
knabino estas el Jugoslavio.

Fotis Krunoslav Tišjar

